esperanto.es

# La Bitbulteno

NUMERO: 11
2014-11-17

**Saluton !**

**He aquí un nuevo número del Boletín Electrónico de la Federación Española de Esperanto.**

**Jen nova numero de la Bitbulteno de Hispana Esperanto-Federacio.**

## EL ESPERANTO EN PROGRAMA TELEVISIVO SOBRE EDUCACIÓN

El sábado 8 de noviembre, en el programa *EDUC@-2* de la televisión regional Canal Extremadura, especializado en temas de educación, se incluyó entrevista con nuestro compañero José Mª Salguero, sobre el taller que imparte sobre esperanto en el Instituto de Enseñanza Secundaria "Cuatro Caminos" de Don Benito (Badajoz).

El programa se puede ver en la red en la dirección www.canalextremadura.es/alacarta/tv/videos/educ-2-081114. El segmento sobre el esperanto comienza en el minuto 11' 19'', y también puede verse de forma independiente en el canal de vídeo de la Federación Española de Esperanto, en la dirección http://www.youtube.com/watch?v=Wpb8MA-Cl3g.

## ESPERANTO EN TELEVIDA PROGRAMO PRI EDUKADO

Sabate la 8-an de novembro, oni elsendis en televida programo pri eduka sistemo de la regiona kanalo *Canal Extremadura*, intervjuon kun nia kolego José María Salguero (*Kani*), pri lia laboro por instruado de Esperanto en la mezlernejo "Cuatro Caminos" de la ekstremadura urbo Don Benito.

La ligilo al la programo estas www.canalextremadura.es/alacarta/tv/videos/educ-2-081114. La parto pri Esperanto spekteblas post la minuto 11' 19'', kaj ankaŭ sendepende en la retkanalo de HEF, en la adreso http://www.youtube.com/watch?v=Wpb8MA-Cl3g.

## DOS CONFERENCIAS SOBRE EL CIELO Y SOBRE EL ESPERANTO

El lunes 17 de noviembre tendrán lugar dos charlas sucesivas sobre Astronomía, una en español, la otra en esperanto, a cargo del astrónomo David Galadí-Enríquez, en el Círculo Cultural Español Antonio Machado de Luxemburgo.

La conferencia en español versará sobre ‘Curiosidades en el cielo observado a simple vista’, y comenzará a las 20 horas. Antes de la conferencia en español (a las 18.30 horas), impartirá en el mismo lugar una charla en esperanto dirigida a la comunidad de esperantistas de Luxemburgo.

David Galadí-Enríquez es astrónomo y trabaja en el Centro Astronómico Hispano Alemán (Observatorio de Calar Alto, en la provincia de

## DU PRELEGOJ PRI LA ĈIELO KAJ PRI ESPERANTO

Lunde la 17-an de novembro okazos du sinsekvaj prelegoj pri Astronomio, unu en la hispana, alia en Esoperanto, fare de la astronomo David Galadí-Enríquez, en la Hispana Kultura Centro Antonio Machado de Luksemburgio.

La hispanlingva prelego temos pri ‘Kuriozaĵoj en la ĉielo observita nudokule’, kaj komenciĝos je la 20 horo. Antaŭ tiu konferenco en la hispana, je la 18.30 horo, David prelegos samloke en Esperanto, por la esperantista komunumo de Luksemburgio.

David Galadí-Enríquez estas astronomo kaj laboras en la Hispan-Germana Astronomia Centro (Observatorio de Calar Alto, en la provinco Almerio). Doktoro pri Fiziko, li estas aŭtoro de diversaj publikigaĵoj sciencaj kaj disvastigaj, inter kiuj "La kosmo kaj ni", unu el la plej elstaraj verkoj

Almería). Doctor en Física, es autor de diversas publicaciones científicas y de divulgación, entre ellas "La kosmo kaj ni", una de las más destacadas obras de divulgación científica en esperanto, editada conjuntamente por la Fundación Esperanto, de Zaragoza, y la Liga de Esperanto de Flandes.

pri populara scienco en la internacia lingvo, kune eldonita de Fundación Esperanto, el Zaragozo, kaj Flandra Esperanto-Ligo.




**ESPERANTO Y UNIVERSIDAD EN EL PRÓXIMO CONGRESO ANDALUZ**

A comienzos de noviembre, la asamblea de la Asociación Andaluza de Esperanto, reunida en Málaga, decidió que el 19º Congreso Andaluz de Esperanto se celebrará del 30 de octubre al 1 de noviembre de 2015 en Jerez de la Frontera.

El tema sobre el que versarán casi todos los actos del Congreso será el de “Foro: Esperanto y Universidad”, y durante el mismo se estudiarán las posibilidades, recursos e iniciativas para que el esperanto sea reconocido en el ámbito universitario a los efectos de acreditación de conocimiento de lenguas e incluso dentro del plan de estudios en los cursos de pos-grado. Se trata de una importante línea de actuación que AEU, con el apoyo de la Federación Española, ha emprendido, y que recibió un impulso tras la celebración del Congreso Andaluz y Español de Esperanto de Ronda, y para el que se quiere contar con la colaboración de la comunidad esperantista universitaria en Andalucía y resto de España.

Por supuesto también se organizarán otros actos culturales, visita turística, etc, todo ello en la lengua internacional esperanto. Sobre todos esos detalles se irá informando en los próximos meses, pero ya animamos a reservar las fechas y prepararse para uno de los encuentros más importantes de esperanto del sur de Europa.

**ESPERANTO KAJ UNIVERSITATO EN VENONTA ANDALUZA KONGRESO**

Komence de novembro, la asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, okazinta en Malago, decidis ke la 19-a Andaluzia Kongreso de Esperanto okazos dum la semajnfino de la 30-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro de 2015 en la urbo Jerez de la Frontera.

La temo de la kongreso, pri kiu temos preskaŭ ĉiuj programeroj estos “Forumo: Esperanto kaj Universitato”, tiel oni studos la eblecojn, rimedojn kaj agadojn celantajn la agnoskon de esperanto ĉe la Universitato, por konfirmi la konon de lingvo kaj eĉ por studi la eblecon enirigi la internacian lingvon ene de universitataj post-gradaj kursoj. temas pri grava agadlinio entreprenita de AEU, kun la apogo de Hispana E-Federacio, kaj kiu ricevis fortan antaŭenpuŝon post la okazigo de la Andaluza kaj Hispana Kongreso de Arundo, kaj por kiu oni deziras kalkuli je la kunlaboro de la esperantista universitata komunumo en Andaluzio kaj la cetero de Hispanio.

Kompreneble, ankaŭ oni organizos dum la Kongreso pliajn kulturajn aktojn, turismajn vizitojn, ktp. Kaj ĉio ĉi en la internacia lingvo Esperanto. Baldaŭ oni informos pli detale pri la okazigo de la kongreso, nun, ni petas al vi rezervi tiun daton por ĉeesti kaj partopreni en la Andaluzia Kongreso de Esperanto, la plej grava esperantista evento okazanta en la sudo de Eŭropo.



## ESPERANTO Y LA FILATELIA

Durante las pasadas semanas ha tenido lugar la XVI Exposición Provincial de Filatelia de la provincia de Alicante. Uno de los temas presentados fue una colección de sellos sobre el esperanto, presentada por nuestro compañero Rodolfo Canet Marín, que recibió un diploma y la felicitación del diputado provincial de Cultura.

La primera fase tuvo lugar entre los días 15 y 28 de septiembre en Benissa. Del 30 de septiembre al 15 de noviembre la exposición se trasladó al Palacio de la Diputación en la capital Alicante.

Puede verse más información y algunas fotografías en: www.filalacant.org/ExpoXVI/. En el siguiente vídeo puede verse brevemente a Rodolfo y algunas imágenes de los sellos sobre esperanto: http://www.youtube.com/watch?v=hTh3qUVTb6s (respectivamente en minutos 1:59 y 2:20)

## ESPERANTO KAJ FILATELIO

Dum la pasintaj semajnoj estis organizta la 16-a Filatelia Ekspozicio de la provinco Alikanto (Alicante/Alacant). Unu el la prezentitaj temoj estis kolekto de poŝtmarkoj pri Esperanto, prezentita de nia amiko Rodolfo Canet, kiu ricevis diplomon kaj gratulon de la provincia deputito pri Kulturo.

La unua fazo okazis inter la 15a kaj 28a de septembro en urbo Benissa. De la 30a de septembro ĝis la 15a de novembro la eksposizio translokiĝis al la Palaco de la Deputitaro en la provincia ĉefurbo Alikanto.

Eblas rigardi pliajn informojn kaj kelkajn fotojn en la adreso: www.filalacant.org/ExpoXVI/. En sekva video oni povas mallonge vidi Rodolfo-n kaj la esperantajn poŝtmarkojn: http://www.youtube.com/watch?v=hTh3qUVTb6s (respektive en minutoj 1:59 kaj 2:20)



## VÍDEOS EN ESPERANTO DESDE ESPAÑA

Ha nacido un nuevo canal de vídeos en Youtube, con imágenes históricas del movimiento esperantista, con el nombre ***"Historiejo"*** http://www.youtube.com/user/Historiejo. Contiene ya intervenciones de algunas figuras veteranas de la comunidad esperantista, como Tibor Sekelj, Claude Piron o István Szerdahelyi, y también presentaciones artísticas históricas, entre las cuales podemos mencionar la presentación completa de la obra de teatro "Picnic en el campo de batalla", del conocido autor español Fernando Arrabal, que representó la compañía Bulgara Esperanto-Teatro en 1987 en Zagreb. Puede disfrutarse de esa perla histórica en: http://www.youtube.com/watch?v=ieveSGVvXBI.

La aparición del canal se debe al trabajo

## ESPERANTO-VIDEOJ EL HISPANIO

Naskiĝis nova kanalo en Youtube, kun historiaj filmadoj pri la movado, nomata ***"Historiejo"*** http://www.youtube.com/user/Historiejo. Ĝi jam enhavas parolojn de Tibor Sekelj, Claude Piron kaj István Szerdahelyi, kaj ankaŭ historiajn artaĵojn, inter kiuj la tuta registrado de la teatra presentado de la verko "Pikniko sur la batalkampo" de la hispana aŭtoro Fernando Arrabal, prezentita de Bulgara Esperanto-Teatro en 1987 en Zagrebo. Ĝuu ĉi tiun historian perlon en: http://www.youtube.com/watch?v=ieveSGVvXBI.

La apero de la kanalo ŝuldiĝas al la senlaca laboro de Miguel Gutiérrez Adúriz ("Liven Dek"). Li ankaŭ prizorgas aliajn kanalojn, inter kiuj la oficiala de Hispana Esperanto-Federacio http://www.youtube.es/esesperanto

incansable de Miguel Gutiérrez Adúriz ("Liven Dek"), que también es el responsable de otros canales de vídeos, entre los cuales el oficial de la Federación Española de Esperanto http://www.youtube.es/esesperanto

Entre las películas más recientes podemos recomendar:

- Turismo a través de la literatura y el esperanto: Miguel Fernández nos guía por diversos escenarios madrileños de la obra "Luces de Bohemia" de Ramón del Valle-Inclán http://www.youtube.com/watch?v=0FE_MXnNHnQ
- Conferencia de Nicola Ruggiero en la sede de HEF, sobre la colosal epopeya "La poemo de Utnoa" escrita en esperanto del escritor catalán Abel Montagut http://www.youtube.com/watch?v=BBQbfomyODA
- Resumen del último congreso de la Asociación SAT, en Bretaña: http://www.youtube.com/watch?v=ZmrE4MUzBo0
- Zlatko Tišljar, secretario de la Asociación Europea de Esperanto, cuenta una anécdota de su vida con relación al esperanto: ¿Por qué los esperantistas se fían de los desconocidos? http://www.youtube.com/watch?v=2IgXzgiA0KI
- Y finalmente, el propio Liven Dek nos muestra otros talentos suyos en el monólogo "Aconséjeme, Doctor Zamenhof" http://www.youtube.com/watch?v=2rjSkPVE0gE.

Abónate a nuestros canales, y visítalos a menudo. Se encuentran joyas continuamente.

Inter la plej ĵusaj videoj oni povas rekomendi:

- Turismo per literaturo kaj Esperanto: Miguel Fernández gvidas nin tra diversaj madridaj scenejoj de la verko "Bohemiaj lumoj" de Ramón del Valle-Inclán http://www.youtube.com/watch?v=0FE_MXnNHnQ
- Prelego de Nicola Ruggiero en la sidejo de HEF, pri la kolosa epopeo "La poemo de Utnoa" de la katalunia verkisto Abel Montagut http://www.youtube.com/watch?v=BBQbfomyODA
- Resumo de la lasta SAT-Kongreso en Bretonio: http://www.youtube.com/watch?v=ZmrE4MUzBo0
- Zlatko Tišljar rakontas anekdoton pri esperantista vivo: Kial esperantistoj fidas al nekonatoj? http://www.youtube.com/watch?v=2IgXzgiA0KI
- Kaj fine, Liven Dek mem montras aliajn siajn talentojn per monologo "Konsilu min, Doktoro Zamenhof" http://www.youtube.com/watch?v=2rjSkPVE0gE.

Abonu niajn kanalojn, kaj vizitu ilin ofte. Oni senĉese trovas juvelojn.

**ASAMBLEA DE LA SECCIÓN JUVENIL**

El próximo 30 de noviembre tendrá lugar la Asamblea General de la Sociedad Esperantista Juvenil Española (HEJS), la sección juvenil de la Federación. El encuentro se celebrará presencialmente en la sede de la Federación, en la calle Rodríguez San Pedro, 13, 3 de Madrid, pero será posible participar vía Skype y otros medios telemáticos. Los miembro de HEJS recibirán una convocatoria formal, ya que uno de los objetivos es la elección de la nueva directiva de la Asociación, pero la asamblea estará abierta también a otros esperantistas españoles menores de 30 años, que deseen colaborar en los objetivos de difundir el esperanto entre los jóvenes. Si estás interesado escríbenos a hejs@esperanto.es.

Más información irá apareciendo en los próximos días en: http://www.esperanto.es/hejs y en las redes sociales (por ejemplo, en nuestras cuentas de Facebook o Twitter).

**ĜENERALA KUNVENO DE LA JUNULARA SEKCIO**

La venontan 30-an de novembro okazos la Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS), la junulara fako de HEF. La renkonton oni celebros en la sidejo de HEF en strato Rodríguez San Pedro, 13, 3, de Madrido, sed eblos ĉeesti per Skajpo aŭ aliaj telematikaj rimedoj. La anoj de HEJS ricevos formalan kunvokon, ĉar unu el la celoj estas la elekto de la nova estraro de la asocio, sed la kunveno estos malfermita ankaŭ al aliaj hispanaj esperantistoj, malpli ol 30-jaraj, kiuj ŝatus kunlabori en la disvastigo de Esperanto inter la junularo. Se vi deziras partopreni, skribu al hejs@esperanto.es.

Pliaj informoj aperos dum venontaj tagoj en la retejo: http://www.esperanto.es/hejs kaj en la sociaj retoj (ekzemple, en niaj kontoj de Facebook aŭ Twitter).

**SE ACERCA EL DÍA DEL ESPERANTO**

El día 15 de diciembre, como todos los años, se celebra el Día Internacional del Esperanto, también conocido como *Zamenhof-Tago*. La mayoría de los grupos de esperanto en España

**ALPROKSIMIĜAS LA INTERNACIA ESPERANTO-TAGO**

La 15an de decembro, kiel ĉiujn jarojn, oni celebras la Internacian Esperanto-Tagon, ankaŭ konatan kiel *Zamenhof-Tago*. La plimulto de la

organizarán algún tipo de celebración, así que te animamos a preguntar en tu club local, o aquél que te pille cerca, para ver qué tipo de conmemoración se va a celebrar.

En la página de la Federación hemos actualizado recientemente el listado de grupos y asociaciones esperantistas, más o menos ligadas a HEF, que actúan en España. Pueden consultarse en http://www.esperanto.es/hef/index.php/grupos-en-espana

También animamos a los grupos y asociaciones a que nos envíen información sobre sus actividades previstas, para que las podamos difundir entre los interesados. Además, si algún grupo observa errores en el listado antes enlazado, indicádnoslo para corregirlo, y si alguna asociación o incluso algún colectivo informal desean que incluyamos sus datos, puede escribirnos a letero@esperanto.es. No es necesario ser miembro de la Federación ni mantener relación estable con ella. HEF también ofrece espacio en su web y la posibilidad de disponer de direcciones en el dominio *esperanto.es* si así se desea.

esperantistaj grupoj en Hispanio organizos ian tipon de celebrado, kaj do ni kuraĝigas la legantojn demandi en sia loka klubo, aŭ tiu sufiĉe proksima, por scii kiujn kunmemorojn oni organizos

En la retejo de la Federacio ni antaŭnelonge aktualigis la liston de grupoj kaj asocioj esperantistaj, pli-malpli ligitaj al HEF, aktivantaj en la lando. oni povas konsulti ĝin en: http://www.esperanto.es/hef/index.php/grupos-en-espana

Ni ankaŭ kuraĝigas la asociojn sendi al ni informojn pri la antaŭvidataj aktivadoj, por ke ni povu disvastigi ilin inter la interesatoj. Krome, se iu grupo konstatas eraron en la antaŭe ligita listo, bv. informi nin por ĝin korekti. Se iu asocio aŭ eĉ neformala kolektivo deziras ke ni aldonu iliajn datumojn, oni povas skribi al letero@esperanto.es. Ne necesas esti membro de la Federacio nek konstante rilati al ĝi. HEF ankaŭ proponas spacon en sia retejo kaj la eblecon disponi je adresoj ĉe la domajno *esperanto.es* se oni tion deziras.